# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

**TESTO 20**

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. ␣ ␣ ␣ r ␣ kiam bone, vi havos kiam bezone.
2. Kiu venas plej frue, sidas plej ␣ u␣.
3. Ne timu tranĉilon, timu ␣ ␣ b ␣ l ␣ ␣.
4. ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ hundoj kuras ĉiam kun vundoj.
5. Ekde fora antikveco Kaŭkazio estis granda kaldrono, en kiu ␣ ␣ n ␣ ␣ ĝ ␣ ␣ popoloj de diversaj lingvoj, vivmanieroj kaj historio.
6. La sinjorino ankoraŭ ŝatus akiri nanan kajmanon, kiu ne postulas tro multe da ␣ p ␣ c ␣ ĉar ĝia maksimuma longeco estas nur 1 metro.
7. La ŝtonoj estos aranĝitaj ŝtupare kaj la pluvakvo venos tra ␣ ␣ b ␣ ␣ el la tegmento de la garaĝo, estigante dum pluvo akvofaleton.
8. Nuntempe oni povas observi en nia lando tragikan ekzemplon de ␣ ␣ c ␣ ␣, kiu sin detruas per patologia toleremo.
9. Ni ellitiĝis je la 3a horo frumatene por pretigi la ␣ ␣ ␣ ␣ z ␣ ␣ ␣ kaj vojaĝsaketojn.
10. Malgraŭ la ekstera malvarmo al la juna viro mankis ␣ ␣ n ␣ ␣ l ␣, li portis nur grizan someran jakon kaj ĝinzon.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Kaj preninte pli da tabako en sian p ␣ ␣ ␣ ␣ Ali rakontis al mi legendon, simplan, sed profunde religian kaj severan.
2. En la unuaj jaroj de la respubliko, pro industria malforto, eĉ n ␣ j ␣ ␣ ␣, sapo, alumetoj kaj aliaj simplaj produktaĵoj devis esti importataj.
3. La ŝuoj por la dancoj estas ellaboritaj el blanka l ␣ ␣ ␣ kaj ne havas kudroliniojn.
4. La kompatinda paralizulo, kiu apenaŭ plu kapablas marŝi, l ␣ m ␣ ␣ t ␣ li trenis sian korpon la ŝtuparon supren kaj malrapide kaj tre ŝanceliĝe pluiris ĉirkaŭ la angulon.
5. Dukapa blanka ␣ ␣ l ␣ estis simbolo de multaj serbaj reĝoj kaj ankaŭ de caro Dušan.
6. Sur la muro de la preĝejo estis surskribo el 1501 indikanta la d ␣ ␣ ␣ ␣ kaj listiganta la nomojn de kvar masonistoj kaj du majstroj kiel farintoj de la preĝejo.
7. Jam baldaŭ sian fabrikon en Rusio planas konstrui *Atlas*, la pola gvidanto de g ␣ ␣ ␣ ␣ por glazuro kaj terakoto.
8. Roerich planis vojaĝi al Oriento, tamen la unua mondmilito kaj lia malbona sanstato devigis lin veturi al Finnlando, kie li pentris pejzaĝojn de s ␣v␣ ␣ ␣ Nordo.
9. Post la forveturo de la filino kun la edzo pasis multe da tempo, la maljunaj geedzoj vivis kiel orfoj kaj peze ĝ ␣ ␣ ␣ ␣ nokte, kvazaŭ post entombigo de la filino.
10. Tiun ĉi cikatron mi ne ricevis dum la milito, mi simple volis r ␣ z ␣ min dum subite gerilanoj atakis nian taĉmenton.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

sever', hak', pes', mut', luks', traduk', kurs', mizer', ĉarm', skulpt'

1. Sidante en kafejo mi spektis deĵorantinon, kiu forigis ebriulon per forta bato, tiel ke la ␣ ␣ z ␣ ␣ ␣ l ␣ falis surteren kaj nur post longe sukcesis ekstari.

2. En la koridoro de nia ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ aŭdeblis viglaj voĉoj de la plej etaj lernantoj.
3. Britaj soldatoj jam atendantaj militon landlime de Irako tro dorlotiĝas – pro ␣ ␣ k ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ (duŝoj, poŝtelefonoj) ili malemas forlasi siajn tendarojn por eniri la dezerton kaj ekmiliti.
4. Tra la diafana blankeco de ŝia vizaĝo en diversaj lokoj montriĝis flavaj strioj, mallumaj arkoj aperis sub la okuloj kaj meze de la ␣ ␣ r ␣ ␣ g ␣ bela frunto troviĝis sulko.
5. Por pluraj horoj dekoj da partoprenantoj propravole iĝis blinduloj, ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ aŭ surduloj kaj devis vivi uzante la aliajn – alternativajn – perceptajn kaj komunikajn sistemojn.
6. Kiam la knabinoj revenis, panjo malfacile povis konservi la ␣ ␣ ␣ ␣ r ␣ c ␣ ␣ de la menso kaj mieno.
7. La japana profesoro Jun-ichi Tsjujii aldonas, ke ankaŭ homaj ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ t ␣ ␣ ne ĉiam liveras perfektajn tradukojn – tian povas liveri nur la aŭtoro de la originala teksto.
8. La juvelisto staris malantaŭ tablo kovrita de vitritaj skatoloj kun oraj objektoj kaj ĵetis la ringon sur negrandan kupran ␣ ␣ s ␣ l ␣ ␣.
9. En la malnova parto de la urbo estas piedira zono, kie troviĝas trinkejo, kies fasado estas ornamita per amuzaj ␣ ␣ ␣ ␣ p ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ de ĝiaj klientoj.
10. Ili aspektis imprese: pintaj ĉapeloj, ␣ ␣ k ␣ l ␣ en la mano, daŭre drinkemaj kaj batalemaj – jen la “vakeroj de Alpoj”.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Veninte en la difinita tago al la pastro, la cigano vidis en la kuirejo, kie neniu estis, barelon kun ___ kaj en tiu ĉi grandan pecon da porka sebo.
   a. kataro b. biletoj c. pizoj d. balonoj
2. Venis la jaro 1968 kun granda espero pri la politikaj ŝanĝoj, sed post la 21a de aŭgusto kaj poste en la jaro 1969 ĉio revenis en la malnovajn ___, ĉiuj esperoj montriĝis vanaj.
   a. kaserolojn b. larmojn c. relojn d. kongresojn
3. Mia ___ sekis kiel senakva puto kaj mi ŝvitis kiel subtorenta pluvo.
   a. gorĝo b. tasko c. nebulo d. magazeno
4. De iom malfermita pordeto de la forno videblis la ludemaj ___, kiuj ĵetis misteran lumon sur la sulkiĝintan kaj velkintan avinan vizaĝon.
   a. vermoj b. beroj c. flamoj d. tabeloj
5. Por elteni kaj ĝui la frostegon, ekzemple en Laponio en oktobro-aprilo, oni ne ekvojaĝu sengante, senĉape kaj sen konvenaj ___.
   a. bienoj b. leporoj c. pugnoj d. botoj
6. Marta kaj Aniko devis forveturi, ili tute ne emis ___ la maron, la ravan naturon, la afablajn posedantojn de la hotelo.
   a. esprimi b. adiaŭi c. surprizi d. evolui
7. Antaŭ forhaki ___, la avo kutime fumis pipon, longe enflaris tabakon, moketis sian nepon, malvarmiĝintan etan Ivaĉjon.
   a. tombon b. pasporton c. kavon d. abion
8. Mi trajne iris ĝis la itala marborda urbeto Bordighera, kaj tie ___ taksion por la dudek-minuta vojaĝo al la princlando.
   a. luis b. ekskursis c. tradukis d. babilis
9. Lastatempe landaj organizaĵoj pri homaj rajtoj kaj la registaro okazigis kampanjon por atentigi pri la neceso ___ la landan justicon.
   a. aspekti b. sonĝi c. fidi d. eksciti
10. Finfine ne eblas ___ politikan konflikton per militaj rimedoj.
    a. verŝi b. petoli c. sterni d. solvi